ESPÉRANTO-NORD
Fédération d'espéranto des régions Nord-Pas-de-Calais & Picardie

**XAVIER DEWIDEHEM**
Président de la Fédération

116 rue Roger-Salengro
59192 Beuvrages
Tél. 03 27 56 27 87, 06 76 03 11 56
Mél. xdewidehem@esperanto-nord.org
**www.esperanto-nord.org**

Retletero publikigita en la retlisto
« Nordo-Pikardio » la 23an de januaro 2008

# Forpasis sinjoro Claude Piron la 22an de januaro 2008 [1]

Kun granda emocio ni hodiaŭ ekscias la forpason de Claude Piron, eminenta esperantisto, kiu multe kaj altvalore agadis por Esperanto. La vortoj estas malfacile troveblaj por esprimi sian senton sekve al tiel abrupta kaj malgaja novaĵo.

Lastatempe ni havis tiun honoron akcepti sinjoron Claude Piron en Bulonjo-ĉe-Maro okaze de la internacia renkontiĝo Boulogne 2005 : tie li entuziasmige prelegis antaŭ plenplena salonego [2]. En la retejon de Lille-Villeneuve-Espéranto unuafoje enretiĝis lia trafa artikolo « Culture et Espéranto ». Kaj en la retejo de nia Federacio ĵus aperis aparta paĝo kun dek liaj prelegfilmetoj pri la lingvoj [3].

Naskiĝinte en la najbara Belgio en 1931, li estis tia homo, kian oni ne forgesos. Lia nomo estos inter la plej altestimaj esperantistaj nomoj. Li donis multon al nia Esperanto-komunumo ; tion ni priatentu kaj plu utiligu por niaj daŭraj streboj por diskonigo kaj agnoskigo de Esperanto.

La Nordfrancia Esperanto-Federacio kaj ĝiaj membroj sincere kondolencas liajn edzinon, filinon kaj intimulojn.

XAVIER DEWIDEHEM
Prezidanto de la Nordfrancia Esperanto-Federacio

(1) Informis i.a. la Libera Folio, *www.liberafolio.org/2008/forpasis-claude-piron*
(2) Prelego « Esperanto : kiaj perspektivoj post unu jarcento ? », *boulogne2005.online.fr/eo/raportoj/prel_piron.htm*
(3) Serio « Les langues : un défi », *www.esperanto-nord.org/fr/esperanto/defilangues.htm*